ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 12(72) Januaro 1972

USONA ĈEFDELEGITO DE UEA ANKORAŬ SERVAS

Kvankam S-ro Armin Doneis sendis eksiĝleteron al D-ro Viktor Sadler, Centra Oficejo de UEA, Rotterdam, la 2an de januaro, 1972, kaj ni ĉiuj timegis, ke Usono estus sen Ĉefdelegito dum ĉi tiu kriza tempo, ni povas feliĉe anonci, ke S-ro Doneis revokis la eksiĝon, kaj restos en la posteno! S-ro Doneis estas forta, fidinda, kompetenta viro, kaj li longtempe, pli ol ni ĉiuj povas scii aŭ kompreni, donis laboron, ĝis la limoj de sia kapablo; kaj ni ŝuldas al li, ne nur dankon, sed helpon. Ŝanĝu ni do la kondiĉojn, kiuj preskaŭ kaŭzis S-ron Doneis forlasi la laboregan, malfacilegan, ĝenan, maltrankviligan, kaj ĉagrenplenan postenon! Promesu ni,1) legi instrukciojn zorge, kaj ne fari erarojn en monkalkulado, 2) plenumi blankedojn, aliĝil-ojn, kaj respondilojn ĝuste, kaj sendi ilin senprokraste, 3) ne skribi al li pri netaŭgaj aŭ malgravaj aferoj!

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Ĉiam dum la fina plentagsemajno en la monato de februaro, ĉijare la 20an ĝis la 27a, feb., 1972, okazos la Semajno de Internacia Amikeco! Belaj salutkartoj kaj afiŝoj, je malaltprezoj, kiujn oni devas uzi fiere por re-memorigi la ĉirkaŭulojn, kaj por saluti la gesamideanojn tra la mondo, estas nun aĉeteblaj. Bonvolu mendi la salutkartojn (desegnitaj de Thelma Liphard, de Indiana) en paketoj de 40, po $1.00, aŭ mendi la afiŝojn (8 1/2"X 11"), en paketoj de 6, po $0.25. Sendu la mendojn al la ELNA-komitatestrino, S-ino Roan Orloff Stone, 504 North Fifth St., Gallup, N.M. 87301, aŭ, se vi bezon-us pligrandajn kvantojn, sendu al S-ro Ken Thomson, P.O.Box 663, Houston, Texas 77001. La poŝtkartoj estas ankaŭ haveblaj sen la vortoj "Semajno de Internacia Amikeco," por ke vi povas uzi ilin dum la tuta jaro.

MORTIS ELNA-AMIKINO EN KALIFORNIA

S-ino Maurita V. Dorn, National City, Ca. (apud San Diego) mortis en novembro, 1971. Ĉi tiu afabla virino havis amikojn tra la mondo, kaj ŝi korespondis kun personoj el multaj landoj. Ŝi naskiĝis en Chippewa, Wisc., la 1an de januaro, 1887, kaj, kvankam ŝi nur lernis la internacian lingvon en 1954, ŝi tuj fariĝis vera esperantistino. Postvivas filo, kiu nomiĝas Dean, kiu rakontis, ke, en ĵurnal-intervjuo en Ottawa, Kanado, ŝi diris, ke sendube Esperanto estas la plej grava afero de la vivo.

OFICIALA ELNA-MEMBROLISTO ELDONOTA

ELNA intencas baldaŭ zorge kunigi ĝustan plenan membroliston, presi kaj dissendi ĝin al la tuta membraro. Antaŭ ol tio, estas grava, ke ni anoncus ĝin, por averti la anojn pri la afero, kaj ankaŭ por doni al ĉiuj la eblecon resti anonime (se oni dezirus). Se oni ial dezirus, ke la nomo ne aperos en la listo, tiu persono devas uzi la taŭgan respondilon, kiu sin trovas finpaĝe. Eltranĉu ĝin kaj sendu ĝin senprokraste, ĉar la respondilo devas atingi la sekretarion (adreso finpaĝe) antaŭ ol la 3a de februaro, 1972.

* * * * * * * *

NOTU: Por rapida servo sendu aliĝilon por UK-57a al P.O. Box 786, Portland, Or.

# ELNA-BULTENO

**KUNFONDINTOJ** Donald Munro † Rodney Ring

**ADRESO** ELNA-Bulteno Muhlenberg College Allentown, Pa. 18104

---

PRESTIĜA SIGNIFPLENA LIBRO NOVA

S-ro Conrad Fisher, eks-sekretario de ELNA, volas atentigi ĉiujn pri la apero de libro, je kiu komisiono de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia), kun anoj el kvin nacioj, laboris naŭ jarojn. Li pensas, ke la signifo de tiu ĉi libro estas komparebla, tute aparte de la praktika valoro por kristanaj rondoj, kun tiu de la Sankta Biblio kaj la Nobla Korano. Ĝi estas himnaro, "Adoru Kantante," kiu estas bele presita sur speciala mal-dika papero, 287 paĝoj en formato 13 X 19 cm., kun fleksebla ruĝa kovrilo. La enhavo konsistas el 262 himnoj (originaj kaj tradukitaj el diversaj lingvoj) kun kvarvoĉaj muziknotoj, uzeblaj por miksita ĥoro aŭ klavara instrumento (piano, orgeno, ktp.). Super ĉiu kanto aperas la komencvortoj en la originaj lingvoj, sed ĉio cetera estas tute en Esperanto. La libron redaktis D-ro Adolf Burkhardt, delegito de UEA kaj prezidanto de KELI, kaj profesoro W.J. Downes, membro de la Akademio de Esperanto. La prezo planita estis 15.80 DM (germanaj markoj) plus afranko, havebla ĉe la Libro-servo de UEA, sed ĝi eble ŝanĝis. Kaj ni ĵus lernis, ke la havinda libro estas ankaŭ havebla ĉe la Informcentro Okcidenta, 410 Darrell Rd., Hillsborough, Ca.

ESPERANTO-FILMO ANKORAŬ SEN-KOST-PRUNTE-PRENEBLA

La bela Esperanto-filmo, farita de FIAT, kiun vidis jam tre multaj grupoj tra usono, baldaŭ re-sendiĝos al Italujo. Se iu, kiu ne jam vidis ĝin, dezirus pruntepreni ĝin senkoste, li povas skribi rekte al Nelda M. Stuck, 831 Tulane Court, Redlands, Ca. 92373.

UTILA VORTLISTO EN GRUPOJ LAŬ UZOFTECO

Grandvalora vortlisto, nomita "La plej-oft-uzitaj Esperanto-vortoj," kiu enhavas 963 vortojn (diverse aranĝitaj), estas senkoste havebla, kontraŭ donaco de $ 0.40 en la formo de kvin okcendpoŝtmarkoj usonaj, ĉe S-ro W.A. Donner, 17303 Mapleboro Rd., Maple Heights, Ohio 44137.

BELKOLORAJ KARTOJ AĈETEBLAJ

S-ro Erik Felker, redaktoro de JEN-Bulteno (de la junularo) anoncis, ke (aldone al la ELNA- afiŝoj kaj kartoj unupaĝe menciitaj, kaj sen "konkura penso") li akceptos mendojn por aliaj salutkartoj, kiujn oni povas fiere sendi al eksterlandaj amikoj, dum la Semajno de Internacia Amikeco. Oni povas elekti stelfloran desegnon kun poemo de Amado Nervo de Meksikio en Esperanto kaj la Hispana lingvo (verda aŭ flava), aŭ origami-birdon kun poemo en Esperanto, de Hilda Dresen (rozkolora aŭ blaŭa). La kosto estas $ 0.15 po unu. Mendu je Erik Felker, 731 Birmingham Rd., Burbank, Ca. 91504.

POSTVIVIS GRAVAN OPERACION ESPERANTO-KURSGVIDANTISTINO

S-ino Jane Wills, 94 West River Glen Drive, Worthington, Ohio 43085, kiu spertis kor-kirurgion en majo, 1971, post la fino de la sonbendigado de sia sukcesplena radio-kurso, feliĉe re-statiĝas nun pli rapide, kvankam ŝi iom suferas kaŭze de artrito. Ŝi sendas dankojn al ĉiuj, kiuj helpis ŝin en la laboro, ekzemple Dorothy Holland (Santa Barbara, Ca.). Ni ĉiuj ĝojegas, ke ŝi resaniĝos, kaj ni gratulas ŝin pro la klopodoj ŝiaj por la movado.

MIKULAS NEVAN LABORAS EN USONO POR LA UNIVERSALA KONGRESO

S-ro Mikulas Nevan, konstanta Sekretario por la 57a Universala Kongreso en Portlando, Or., 29 julio - 5 aŭgusto, 1972, kiu kutime loĝas kaj laboras en Rotterdamo (por UEA), nun laboras en nia lando, kaj faras preparadon por la tuta okazo. Li atingis Portlandon la 3an de decembro, 1970, kaj komencis tuj siajn taskojn. Dimanĉe, la 5an de decembro, en la domo de Hans kaj Carolyn Schnoor, li ĝuis manĝ-kunvenon kun grupo (25) de lokaj esperantistoj. Mal-longtempe poste, Portlanda ĵurnal-artikolo ("The Journal") rakontis, kiel, kvankam S-ro Nevan komprenas la anglan lingvon, li respondis al la demandoj de la ĵurnalistoj tie, en intervjuo, en Esperanto, kaj S-ro Jim Deer (estro de la loka kongres-komitato) tradukis. S-ro Nevan prelegis je la SFERO-bank-edo en San Francisco, Ca., la 12an de decembro, kaj priparolis la preparadojn por la UK. La inspiremaj vortoj kaŭzis pli da registradoj en la ĉirkaŭaĵo. Helpis ankaŭ en la varbado, ke li kaj S-ro Deer aperis en televida intervjuo en Portlando, vespere, dum la loka 10-hora novaĵprogramo (channel 12). Bonvolu legi la mesaĝon de S-ro Nevan sur la 5a paĝo.

BONA KAJ SERIOZA IDEO EL OHIO

S-ro Paul J. Lareau, prezidanto de la Toledo- Esperanto-Klubo, dum la monato de novembro, 1971, skribis leterojn al siaj du senatanoj (S-ro Taft kaj Saxbe), al sia kongresano (S-ro Ashley), kaj ankaŭ al aliaj personoj, inkluzivante la senatanojn de Oregono, en kiuj li sugestis, ke ili subtenos leĝdonadon, kiu favoras Esperanto. Li ankaŭ havis la ideon, ke usono devas eldoni poŝtmarkon pri la 57a Universala Kongreso en Portlando. Pri tiu ĉi ideo li ankaŭ skribis (pli detale) al la usona poŝtestro. Inter la pluraj respondoj, kiujn li ricevis, estis la grava anonco, ke la sugesto "konsider-iĝas" je la Komitato de Civitanoj por Konsilo pri Poŝtmarkoj! Multaj aliaj personoj ankaŭ skribis, precipe el Kalifornio, pri la afero, kaj S-ro Lareau esperas, ke aliaj esperantistoj skribos al la diversaj kongresanoj, kaj al S-ro Gordon C. Morison, Division Mngr., Philatelic Affairs Division, Office of the Postmaster General, Washington, D.C. 20260.

## NI KORESPONDU

Eksiĝinta komercisto, kiu ĵus lernis la lingvon, kaj nun havas sufiĉan tempon liberan por korespondi, volas interŝanĝi informplenajn leterojn kun skribemuloj de "nia vasta lando." S-ro George Frost, 25 Roberts Rd., Exeter, Devon, Anglujo (England).

40-jara inĝeniero deziras korespondi kun usonanoj pri ĉiuj temoj. S-ro Dimo Jankov, Asen Halaĉev 33/3, Plovdiv 4, Bulgario (Bulgaria).

17-jara knabino, kiu loĝas en la estona ĉefurbo Tallinn, malnova kaj historplena interesa urbo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun usonanoj, kaj, ankaŭ, korespondi pri "nia bela lando." F-ino Ulle Saarestik, Fahe, Tee 11, Tallinn 200019, Estonio (Estonia, Soviet Union).

27-jara viro volas akiri usonajn geamikojn, kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn. S-ro Simeon Dimov, ul. Al. Stambolijski N.5, Urbo Kub-rat, Bulgario (Bulgaria).

Sveda fraŭlino, kiu havas intereson pri muziko, libroj, piano-ludado, kaj en la kolektado de poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, esperas korespondi kun usonanoj. F-ino Maria Johansson, 510 16 Skene, Hedbovägen 3, Svedujo.

# ARTIKOLOJ

Ĉi tiu estas la daŭrigo de la "felietona prezentado" de Originalaj kaj Tradukitaj Poemoj de L.L. Zamenhof, kolektitaj de Adolf Holzhaus, 1970.

## HO MIA KOR'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for !
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor' !

Ho, mia kor' ! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor' !
Sufiĉe ! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor' !

## AL LA "ESPERANTISTO"

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon,
Kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
Sub bona stelo, en feliĉa horo !

Amikoj de proksime, malproksime,
Salutas vin, ho nia luma stelo !
Konduku nin senhalte kaj sentime
Al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estos nia vojo
Kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos,
Sed batalante kun plej granda ĝojo
Senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l'komenco,
L' unua muro estas trarompita.
Kaj dolĉa estos nia rekompenco,
Kiam la celo estos alvenita!

## AMIKO

En ĝusta tempo ni aŭdas la signalojn
Kaj batalĝoje nun leviĝas nia brusto.
Nin antaŭen ĉiujn konduku en venkradio
Ek al batalo, la vigla emo de l'spirito!

Jes, amikoj, kuraĝaj, fidelaj, de proksime kaj malproksime
Vin salutas favora stelo luma kaj pura.
Ek nun al celo ! La penojn ni portos volonte,
Se utilos al strebado, oferi tutan forton.

Al venko ja kondukas dornsemitaj vojetoj,
Kaj kie floras floro de l'suferkaliko,
Tie oni, plejĝoje batalante, ne konas kompaton,
Ĉar en strebado ardas nur l'espero.

La baroj de l'komenco estas nun neniigitaj,
Kaj kie malhelpaĵo kuŝis tur-amasigita,
Staras fiere ĉe la celo la standardo levita
Al la venko! La unua muro estas konkerita!

(Tradukis A. Holzhaus el la germana lingvo: La poemo titoliĝis "Ein Freund")

---

## TELEGRAMOJ DE L. ZAMENHOF

la 15 majo, 1892, al societo "Espero"
en S. Peterburg

Benitan komencon
kreskantan potencon
en floro kaj gloro
deziras el koro
L. Zamenhof

la 8 feb., 1913, al F. Moscheles
en Londono

Konservu plenege, amiko, plej kara,
viglecon kaj sanon ĝis festo centjara
Zamenhofoj

# OFICIALAĴOJ

## MESAĜO AL USONAJ ESPERANTISTOJ

de Mikulas Nevan

En la tagoj decembro 3, 1971, ĝis januaro 6, 1972, mi restadis en Portland, Oregon, por doni mian helpon al la Loka Kongresa Komitato de la 57-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi faris multajn utilajn kontaktojn al diversaj personoj kaj instancoj. Mi havis gazetaran kaj televidan intervjuojn. Inter aliaj taskoj, mi detale ekzamenis la kongresejon Hilton kaj la loĝejojn. Mi konstatis, ke la ofertitaj prezoj estas tre favoraj konsidere al la bonega nivelo.

Kune kun la LKK mi kompilis la provizoran kongresan programon, fiksis la ekskursojn, kolektis materialojn por la Oficiala Bulteno (Dua) kaj faris tutan aron da aranĝoj por la kongreso. Dum mallonga vizito en San Francisco mi konatiĝis kun la preparlaboroj de la Oficiala Postkongreso. Kun speciala aprezo mi notis la financan subtenon, kiun pere de ELNA donas multaj unuopaj personoj al la kongresa kaso. Laŭ ĝenerala rigardo ĉiuj organizaj laboroj por la monda manifestacio de la esperantistaro evoluas kontentige.

Bedaŭrinde, malpli ĝojiga kaj por la organizantoj entuziasmiga restas la fakto, ke ĝis la nuna momento aliĝis al la kongreso el tuta Usono malpli ol 100 personoj. Mi estas konvinkita, ke entute esperantistoj en Usono nombras multoblon de tiu cifero. Kie ili estas? Ĉu ili ne aŭdis pri la kongreso? Se jes, ĉu ili komprenas, ke per la aliĝo kaj partopreno ili kontribuas al la fortigo de la Esperanto-movado en Usono, al akiro de novaj pozicioj por la Internacia Lingvo? Ĉu ili scias, ke ankaŭ la prestiĝo kaj reputacio de la Usona movado rigarde al la eksterlanda publiko multe dependas ĝuste de la Usona reprezentantaro?

Mi esperas, ke ĉiu leganto de ĉi tiu mesaĝo, kiu ankoraŭ ne aliĝis al la kongreso, baldaŭ ekkomprenos la bezonon tion fari. Sen prokrasto. Oni memoru, ke la Universala Kongreso okazas en Usono denove post 57 jaroj! Pensu, ke eble refoje pasos kelkdeko da jaroj, kiam Usono gastigos UK-on.

Dankon pro via atento. Sukceson al la 57-a!

---

**BONVOLU ELTRANĈI LA SUBAN PARTON KAJ SENDI ĜIN, KUN MONO, AL LA KASISTINO:**

**Peggy Linker, 1414 Monroe St., Walla Walla, Wa. 99362**

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

ELNA 197__

**Mi enmetas la kotizon kiel subindikitan. Mia nomo kaj adreso ĝuste aperas sur la alia flanko (dorsflanke).**

KONTRIBUANTA MEMBRECO

___KONSTANTA ($8.00)
___EDZIĜPARA ($12.00)
___SUBTENA ($15.00)
___PATRONA ($25.00)
___DUMVIVA ($160.00)

**Mi elektas la jenan senpagan gazeton:**
___Kontakto
___Oomoto
___Heroldo (nur novaj abonantoj)

____KUNDONACO

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

___STUDANTO ($3.00), plentempa kaj malpli ol 30-jaraĝa _____NASKIĜJARO
___EKSIĜULO ($4.00), pli ol 62-jara post kvinjarabono.

NOVA ABONO_____ _____ABONRENOVIGO

---

Ĉi tiu Respondilo devas atingi S-ron Bailey antaŭ ol la 3a de feb., 1972.

AL: ROBERT BAILEY
147 Birch St. #4
Redwood City, Ca. 94062

MI VOLAS RESTI ANOMIME JE LA VENONTA ELNA-MEMBROLISTO.

____________________________

SUBSKRIBU...LITERUME...

---

↑ SE VI NE PERMESAS LA UZON DE VIA NOMO EN LA LISTO, ELTRANĈU KAJ SENDU !! ↑

## OFICIALA ELNA-ADRESARO

**PREZIDANTO**
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

**VICPREZIDANTO**
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

**SEKRETARIO**
Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

**KASISTINO**
Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

**KORESPOND-DIREKTORINO**
Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

**SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO**
Komitato de ELNA
P.O. Box 663
Houston, Texas
77001

**INFORMCENTRO OKCIDENTA**
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010

**ARKIVISTO**
D-ro B. J. Balcar
62 Via Castanada
Monterey, Ca.
93940

**INFORMCENTRO NOVJORKA**
156-5th Ave. Rm. 821
New York, N. Y.
10010

---

**ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA**
Information Center, Rm. 821
156 FIFTH AVENUE
NEW YORK, N. Y. 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
**Paid**
Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED

ADDRESS CORRECTION REQUESTED

[redacted]

E1